

Christoph von Schmid,
Ho venu, infanoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ho venu, infanoj, ho venu nun al
La trogo ĉi tie en dombesta stal'!
Ekvidu, por kio en nokt' tiu ĉi
Treege ĝojigas nin la kara Di'.³

Rigardu la bebon, en trog' kuŝas ĝi,
Rigardu ĝin ĉe l' brila lumo-radi'!
Jen kuŝas en vindoj l'infan' de l' ĉiel',
Ĝi estas pli bela ol ĉiu anĝel'.

Sur fojno kaj pajlo en stal' kuŝas ĝi,
Rigardas ĝin ĝoje Jozef' kaj Mari',
Paŝtistoj genuas sub ĝi en ador',
Kaj supre jubilas anĝeloj en ĥor'.

Kaj same adore genufleksu vi,⁴
Eklevu la manojn kaj danku al Di'!
Kunkantu, infanoj, jubilu nun kun
La ĥor' de l' anĝeloj kaj ĝoju vi nun.

Vi preĝu: Ho kara infano de Di',
Ho, kion suferas pro nia pek' vi!
En trogo jam estas mizer' via sort',
Kaj jen sur la kruco amara la mort'.

...

³aŭ: Nin nun nia Di'.(por eviti la akcentitan vorton „la“)

⁴aŭ eble pli konvene:

Genuu nun vi.

Christoph von Schmid,
Infanoj, ho venu

tradukita de Joachim Gießner

Infanoj, ho venu, ho venu nun al
la krip' en Betleĥem, mizerpovra stal'.
Rigardu l' miraklon donitan al ni
de l' patro ĉiela ĉi nokte de Di'.

.....
.....
.....
.....

Jen kuŝas sur pajlo kaj fojn' l'infanet'.
Ĝin gardas Mari' kaj Jozef' en kviet'.
Paŝtistoj preĝadas en sankta ador',
ĉiele anĝeloj jubilas en ĥor'.

Genufleksu same ankoraŭ nun vi,
kaj levu la manojn kaj danku al Di'.
Kunkantu infanoj en tuta la land',
plenĝoje kun supra anĝela glorkant'.

.....
.....
.....
.....

...

Ho, kion ni donu, donacu nun ni
 por tio, plej kara infano de Di'?
 De l' mondo riĉeco, de l' mondo trezor'
 Ne plaĉas al vi, humila nur kor'.

Ofere nun prenu la korojn de ni,
 Volonte ni donas ĉi tiujn al vi;
 Sanktigu vi ilin, ke en unuec'
 Kun vi ili restu en la eternec'.

*Traduko de la Germana poemo "Ihr Kinderlein, kommet" de CHRISTOPH VON SCHMID (Kristofo de Smido, *1768 - †1854) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982.*

MR-015-3 / Arg-296-600 (2005-02-23 20:29:21)

La originan tekston mi, Manfred Retzlaff, prenis el la interreto, el "http://ingeb.org/Lieder/IhrKindr.html". Oni kantas la kanton laŭ melodio, kiun en 1794 verkis la komponisto Johann Abraham Peter Schulz (1747 - 1800).

*Traduko de la Germana poemo "Ihr Kinderlein, kommet" de CHRISTOPH VON SCHMID (Kristofo de Smido, *1768 - †1854) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-296-601 (2005-02-23 20:52:56)

Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiu ĉi tradukversion el la interretejo "http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html" kaj el la kantlibro "Mia kantaro I" de Joseph Schiffer [Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, tel. 0049-(0)7721-5 89 91].